

Theodor Storm,  
Kristnaska kanto

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

De la ĉielo ĝis la tero  
malsupren ridas milda stel';  
de l' abiar' odor-aero  
blovadas spire tra l' etero  
kaj nokte regas brila hel'.

Plenigas min ĝojiga timo.  
Ja estas nun la sankta hor'!  
Sonoras en la malproksimo  
preĝeja sonoril'. – Sen limo  
feliĉa estas mia kor'.

Min ree tenas sorĉo pia.  
Adore, mire staras mi,  
aperas al animo mia  
infana songo idilia.  
Miraklo estas tio ĉi.

*Traduko de la Germana poemo "Weihnachtslied" de THEODOR STORM (Teodoro Stormo, \*1817-09-14 – †1888-07-04) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04).*

*Arg-107-216 (2003-12-25 22:06:31)*